

Esperanto por UN

Informilo de la oficejo de Universala Esperanto-Asocio por rilatoj kun Unuiĝintaj Nacioj

Numero 53, julio-aŭgusto 2021



Universala Esperanto-Asocio

Demando al la Ĝenerala Sekretario: Multlingvismo kaj Unuiĝintaj Nacioj

Universala Esperanto-Asocio rekonas la simpatian atenton esprimitan de la Ĝenerala Sekretario koncerne demandojn de multlingvismo en UN, en tio, ke li pledas por la graveco de komunikado inter la homoj en lingvoj kiujn ili komprenas – kaj aŭskultado de iliaj respondoj. Pro tio, ĝi lastatempe prenis okazon direkti demandon pri lingvoj al s-ro Guterres, en UN-kunveno por kandidatoj por la venonta deĵorperiodo de la Ĝenerala Sekretario:

“Kun siaj ses oficialaj lingvoj, multlingvismo estas kerna al la kunlabora problemsolva laboro de Unuiĝintaj Nacioj. Krome, se oni konsideras la urĝan bezonon rekonstrui post KOVIM-19 kaj la esencan laboron por atingi la Celojn por Daŭripova Evoluigo, komunikado kun civila socio per lingvoj kiujn la homoj komprenas estas pli grava nun ol iam ajn. Kiel NRO en konsulta statuso kun UN kiu celas pacon per interkultura interkompreniĝo, Universala Esperanto-Asocio (UEA) demandas al la kandidatoj kiel ili antaŭenigos multlingvismon en la ĉiutaga laboro tra la tuta UN-komunumo kaj en komunikado kun la civila socio.”

Kvankam la komitato respondeca pri la kunveno ne elektis por respondo la demandon, prezentitan de Prof. Francis Hult, unu el la reprezentantoj de UEA ĉe Unuiĝintaj Nacioj, la demando reprezentas gravan eron de la tagordo de Universala Esperanto-Asocio en ties kunlaboro kun Unuiĝintaj Nacioj. Ĉiam pli ofte, oni diras, ke UN devas aŭskulti la multajn voĉojn de la popoloj de la mondo – sed tio implicas, ke oni komprenu iliajn lingvojn, traktante ilin laŭ iliaj kondiĉoj, ne laŭ siaj. Konversacio estas dudirekta: aŭskulti kaj kompreni estas egale grave kiel paroli. Kiam UN dediĉos al la lingva demando la konstruan atenton, kiun ĝi meritas?

Tutmonda kurso kondukis hispanparolantojn al Esperanto

Aldone al abundaj kursoj en Esperanto alireblaj rete kaj en landoj tra la tuta mondo, Universala Esperanto-Asocio, kunlabore kun Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO) kaj Esperanto-asocioj en Kolombio kaj Hispanio, lastatempe organizis mallongdaŭran tutmondan kurson en Esperanto por hispanparolantoj kiu allogis pli ol 500 partoprenantojn, ĉefe el Kolombio, Meksiko, Argentino, Hispanio, Peruo kaj Usono. Dekdu instruantoj, el Kolombio, Meksikio, Ekvadoro, Argentino kaj Venezuelo gvidis la kurson, kiu levis partoprenantojn al konversacia nivelo kie ili povis plene partopreni en la internacia Esperanto-komunumo.

Esperanto-tago kaj la Internacia Tago de Amikeco 2021

La semajno de 25-30 julio estas aparte grava al la esperantista komunumo.

26 julio 2021, estas la 134a datreveno de aperigo de la Internacia Lingvo Esperanto kaj estas festata en la Esperanto-movado kiel la **Esperanto-Tago**. La iniciatinto de la lingvo, d-ro L.L. Zamenhof, senlace laboris por la disvastigo de paco kaj interkompreniĝo kaj por la amikeco de la popoloj de la mondo. En tiuj fruaj jaroj de Esperanto, multaj individuoj kaj organizoj alprenis Esperanton kaj utiligis ĝin por antaŭenigi pacon. Hodiaŭ, parolantoj de Esperanto troviĝas ĉie en la mondo, kalkuleblaj per milionoj kaj troviĝantaj en la plimulto de la Membroj Ŝtatoj de Unuiĝintaj Nacioj. Laŭ la ekzemplo de sia fondinto Zamenhof, ili laboras por kunigi la homojn en spirito de paco kaj fido.



La 30-a de julio estas la **Internacia Tago de Amikeco**. Antaŭ dek jaroj, en 2011, la Ĝenerala Asembleo de UN deklaris tiun tagon la Internacia Tago de Amikeco, surbaze de la alvoko de Unesko, dek kvar jarojn pli frue, ke oni kreu Kulturon de Paco, t.e. “aron da valoroj, vidpunktoj kaj kondutoj kiuj malakceptas perforton kaj celas malhelpi konfliktojn per alfronto de iliaj kaŭzaj radikoj.”

Inter tiuj kaŭzaj radikoj estas manko de interkompreniĝo inter la popoloj de la mondo, kaj inter la kaŭzaj radikoj de la manko de kompreno estas la problemo de lingvoj.

Ni mondanoj, tute nete, ne komprenas unu la alian.

Tra la tuta mondo troviĝas homoj sen privilegioj, kiuj vivas en malriĉo, kiuj suferas pro manko kaj malsano, kiuj restas senpovaj en la manoj de la potenculoj, kaj kiuj estas forigataj el siaj hejmoj pro militoj kaj naturaj katastrofoj. Multaj el ili parolas lingvojn kiujn ni ne komprenas: eĉ se ni klopodas aŭskulti, ni ne povas

kompreni ilin. Tro multaj homoj el inter ni estas indiferentaj al tiuj lingvaj diferencoj, kiel d-ro Zamenhof celis klarigi antaŭ pli ol unu jarcento.

Multaj tiuj homoj perdas siajn lingvojn: minoritataj kaj indiĝenaj lingvoj formortas, kune kun la historio kaj scioj ligitaj al ili.

Universala Esperanto-Asocio, kune kun la esperantista komunumo kies parto ĝi estas, estas firme dediĉita al la renkontigo de homoj trans limoj geografiaj kaj ekonomiaj, trans diferencoj de raso kaj

religio, klaso kaj socia statuso, politiko kaj ideologio. Amikeco kaj komuneco ne estas nur “molaj valoroj” sed vere la substrukturo de paco kaj konfido.

La ĉi-jara virtuala kongreso de Esperanto, kiu kunvenigis milojn da homoj, fermiĝis la 24-an de julio. Ĝia ĉefa temo estis **Paco kaj Konfido**, rekone al la Internacia Jaro de Paco kaj Konfido deklarita de Unesko kaj Unuiĝintaj Nacioj por la jaro 2021. Ni kuraĝas esperi, ke en tiu ĉi jaro de pandemio kaj naturaj katastrofoj, kiam la konfido inter la popoloj estas sub streĉo pli intensa ol iam ajn antaŭe, la mondo frontos la defion.

Okaze de la Esperanto-Tago, ni parolantoj de Esperanto, pasiginte la ĵusajn kelkajn tagojn ĉe nia kongreso praktikante pacon kaj akcelante konfidon, redediĉas nin al antaŭenigo de interkompreniĝo kaj, je la okazo de la Internacia Tago de Amikeco, al la amikeco, kiun la mondo tiel urĝe bezonas. **Amikeco dependas de konfido; konfido dependas de kompreno – kaj amikeco, konfido kaj kompreno dependas de realisma pritakso de la bezonoj de la mondo en tempo kiam eĉ nia ekzisto estas minacata.**



Monda Esperanto-kongreso denove virtualas

Dumilo da homoj aliĝis al la nunjara virtuala Universala Kongreso, kiu anstataŭas la antaŭvidatan fizikan aranĝon en Belfasto, Norda Irlando, en julio. La unusemajna kongresa programo enhavas aferkunsidojn, kulturajn prezentojn, prelegojn, kaj diversajn aliajn aranĝojn – interalie virtualan aŭkcion, komunajn manĝojn kun partoprenantoj el multaj landoj, kaj virtualajn turismajn vojaĝojn. La venontjara kongreso okazos fizike en Montrealo, post prokrasto de du jaroj kaj anstataŭigo en 2020 de Monda Festivalo de Esperanto kiun partoprenis pli ol 10.000 personoj.

Junularo por lingvaj rajtoj okaze de KOVIM

La efiko de la pandemio KOVIM-19 kaj la vojo al renormaliĝo estis temo de Flanka Aranĝo de la Altnivela Poliitika Forumo de UN la 12-an de julio, organizita de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO) kunlabore kun Universala Esperanto-Asocio (UEA). La kunveno koncernis lingvajn rajtojn: la fundamenta rajto de ĉiu homo elekti sian lingvon aŭ lingvojn por komunikado en privata same kiel publika medio. Jam pli ol unu jaron post ekesto de la pandemio KOVIM-19, internaciaj institucioj kaj organizoj rimarkas kaj raportas pri la manko de respekto, kaj pluraj perfortoj, de fundamentaj homaj rajtoj. Tio inkluzivas lingvajn rajtojn; fakte ankaŭ tiuj rajtoj suferis pro la rapida transiro de la plimulto de profesiaj, edukaj, personaj kaj sociaj agadoj al perreta medio. Dum la krizo, esploristoj substrekas la neceson, ke funkciuloj pri publika sano liveru informojn en gamo da lingvoj, kaj precipe liveru informojn pri publika sano por indiĝenaj popoloj tra la mondo. Kiun rolon havas gejunuloj tiurilate, precipe en postnormaliĝaj socioj?

Ĉefparolantoj en la aranĝo estis Cecilia Gialdini, itala esplorstudento en la Universitato Ulster en Norda Irlando, kiu okupiĝas pri lingvopolitiko kaj lingvoplanado en krizaj situacioj, kaj profesoro Francis Hult, fakulo pri lingvoedukado kaj lingvopolitiko ĉe la Universitato de Marilando Baltimore County, Usono.

Celoj de la aranĝo estis (1) konsciigi pri la graveco de lingvaj rajtoj, kaj precipe kiel ilin efikis la pandemio KOVIM-19, (2) substreki la rilaton de lingvaj rajtoj al la Celoj por Daŭripova Evoluigo (CDE), precipe CDE 3, 4, 10, 16 kaj 17, kaj (3) levi la konscion pri lingva diskriminacio ĝenerale. La kunveno montris kiel parolantoj de minoritataj lingvoj estas ofte malhelpataj partopreni la formuladon kaj aplikon de politikoj, kaj kiel decidofarantoj povas enplekti ilin, se ili elektas tion fari. La kunveno ankaŭ proponis okazon por formi koaliciojn inter junularaj organizoj kaj interrilati ĝenerale.

UEA gratulas la Ĝeneralan Sekretarion de UN okaze de ties re-elektiĝo

Promesante la subtenon de lia organizo en la estontaj jaroj, Prezidanto de Universala Esperanto-Asocio Duncan Charters lastatempe gratulis la Ĝeneralan Sekretarion de UN António Guterres pro ties re-elektiĝo, laŭdante lian apartan atenton al lingvaj demandoj.

“Konsiderante nian specialan interesigon pri lingva justeco kaj pri antaŭenigo de pli bona kaj pli egalisma komunikado inter la parolantoj de la lingvoj de la mondo,” Profesoro Charters skribis, “ni estas aparte kontentaj pri viaj klopodoj vastigi multlingvismon kaj lingvan egalecon en la laboro de Unuiĝintaj Nacioj. Ni plene samopinias pri via emfazo je tio, ke ni devas aŭskulti la popolojn de la mondo je ilia bontrovo kaj ne je nia, kaj en iliaj lingvoj.”

Professor Charters rememorigis pri la propraj vortoj de la Ĝenerala Sekretario en ties konsenta parolado, kiam s-ro Guterres deklaris, ke li faros ĉion eblan por “garantii la ekfloron de konfido inter nacioj grandaj kaj malgrandaj, por konstrui pontojn, kaj por senĉese engaĝiĝi en la konstruado de konfido.” Prof. Charters krome atentigis pri la raporto lastatempe prezentita fare de la Komuna Inspekta Unuo de UN pri lingvouzado en UN kaj pri la pozitiva respondo de la Unuo koncerne la emfazon je multlingvismo.

“La Esperantista komunumo staras helpopreta kontribui per niaj rimedoj en ĉiuj eblaj manieroj,” skribis prez. Charters. “Ĉar la nuna jaro estas la Internacia Jaro de Paco kaj Konfido,” li aldonis, “nia Asocio dediĉas apartan emfazon al tiu temo kiel ĉeftemo de nia virtuala monda kongreso de 2021, baldaŭ okazonta ĉi-monate. Ni plusekvos la daŭran edukadon de niaj membroj, kaj trovis, ke la virtuala medio de la pasinta jaro montriĝis aparte favora al antaŭenigo de tiuspeca kontinua dialogo.”

Oficejo por rilatoj kun UN, Universala Esperanto Asocio, 777 United Nations Plaza, New York, NY 10017. [1] 212-687-7041. www.esperantoporun.org.

